**La babiladaj rondoj** okazos je la **19h30**, vendrede

La gastiganto preparas mem simplan manĝaĵon (manĝon kaj deserton).
La invitatoj alportas **nur** trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Alfine, ĉiuj donacas monon
al la gastiganto por partopreni al liaj elspezoj kaj ankoraŭ al la lupago ĉe Espace Dickens

**"Ambaŭa":** **la 6-an de majo,** Rosario invitos nin ĉe Espace Dickens
**la 3-an de junio,** Francisko invitos nin ĉe Espace Dickens

**"Okcidenta":**

**la 27-an de majo**
ĉe Gilbert Darbellay
ch. de l'Orme 6, Morrens
079 315 14 13

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/poll/8dk45bkb8brdf2nd

**"Orienta":**

**la 20-an de majo**
ĉe Clea Robin
ch. de Culat 20, Vouvry
024 481 33 06

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6

**Bazaro en *la Palud***, 4 personoj inter la 09h30 kaj 12h30
Sabate la **14-an de majo** - la **2-an, la 16-an k. la 30-an de julio**
Por partopreni, aliĝu ĉe : http://doodle.com/poll/4i9p85gmbb7y7wen

## Laŭzana Esperanto – Societo


Poŝtfako – Case postale 246 * CH – 1000 LAUSANNE 22
+41 76 411 14 55 * +41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
www.facebook.com/societedesperanto.lausanne
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8
Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 – Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


**Laŭzana Esperanto-Societo**

# Informilo

majo 2016 – n° 5

## Lunde, la 2-an de majo

je la 20-a, ĉe Espace Dickens.

**David Buhlmann, nia prezidanto, prelegos pri la historio de la kanalo de *"Entre-Roches"***



**Sa, la 11-an de junio** : *Jara ekskurso*
*Vidu kiel aliĝi ĉi-poste*

## Somera paŭzo



5-an de septembro : *Decidota*
3-an de oktobro : *Decidota*
7-an de novembro : *Decidota*

**Proverbo de L.L. Zamenhof:**
*Griza barbo saĝon ne atestas.*



### Enigmo

Ĝi povas esti blanka aŭ nigra, tiam ne havas la saman celon…
Oni timas pri ĝiaj ŝerctrompoj, ĝi povas regiĝi per bastoneto.
Kio ĝi estas ?

*La respondo aperos en la venonta informilo.*

# Jara ekskurso

**de la Laŭzana Esperanto-Societo**

**sabate la <u>11-an de junio</u>**



Ĉi-jare, ni malkovros la novan muzeon …

## « *Chaplin-a Mondo* » (Chaplin's World)

Ni proponas iri trajne, ĉar la parkejo de la muzeo estas malgranda.

Rendevuo antaŭ la stacidomo de Vevey, je la 9:45. De tie ni iros kune per buso ĝis la muzeo *Chaplin* (buslineo 212).

Surloke : privata gvidata vizito – france -, ĉirkaŭ 2 horoj kaj ni tagmanĝos en la restoracio de la muzeo.

Prezo por eniro, vizito, tagmanĝo : CHF 60.-[1] (sen trinkaĵoj).

La membroj de aliaj Svisaj Esperanto-Kluboj estos bonvenaj !

- Bonvolu aliĝi **<u>nepre antaŭ la 15-a de majo</u>** pagante la sumon al la konto de LES ĉe CCP 10-26785-8 (Laŭzana Esperanto-Societo) kun mencio « **jara ekskurso** ».

## Biblioteko de la Laŭzana Esperanto-Societo

Kiel oni diskutis dum la lasta Ĝenerala Asembleo, ni restarigis la bibliotekon, kiu antaŭe kuŝis – kaj dormis... - en la meblo de la stacidoma Bufedo.  Nun pli ol 150 libroj kaj dokumentoj staras ĉe Charlotte Blanc Maillard, en Vevey. La membroj estas invititaj prunti kaj legi tiujn trezorojn de la Esperanta lingvo. La estraro invitas la membrojn prezenti dum kelkaj minutoj en vonota kunsido aŭ babilada rondo, la libron kiun ili legis. Samtempe kun tiu informilo vi ricevas la liston de la libroj kaj la regulojn pri la prunto.

Notu ankoraŭ, ke vi povos kaj rajtos (!) donaci – aŭ alprunti - aliajn librojn aŭ dokumentojn, kiuj staras en via biblioteko por ebligi al ĉiuj profiti malkovri ilin !

*MEMORE*

*Kiel delikate*
*la luno*
*desegnas ombron*
*de branĉetoj junaj*
*sur mia kurteno*
*ora*

*tiel delikate*
*la nuno*
*revekas nombron*
*da memoroj lumaj*
*pri nia kunteno*
*kora.*

*(Claude Piron)*

*POEMO*

*Silento.Tra l'ĝarden' la*
*vent' aprila*

*Balaas en la*
*posttagmezo brila*

*Foliojn postrestintajn*
*de aŭtuno,*

*Kiujn ne vekos el la*
*mort' la suno.*

*(el poemo de Kalmán*
*Kalocsay)*

[1] Por la aktivaj membroj de LES : CHF 45.-